Johann Wolfgang von Goethe,

Same

tradukita de Pejno Simono

Super montopintoj —
silent',
tra pinopingloj
la senvent'
spiras sen fort';
arbare la birdoj ekmutas.
Pretu, aludas
silento pri mort'.

...

Johann Wolfgang von Goethe,

Super montoj regas kviet'

tradukita de Poul Thorsen

Super montoj
regas kviet',
tra l' foliaro
nur ventet'
spiras kun trem'.
Birdoj arbare silentas,
se vi atendas,
pacas vi mem.

...

Johann Wolfgang von Goethe,

Из Гёте

tradukita de Михаил Лермонтов

Горные вершины
Спят во тьме ночной;
Тихие долины -
Полны свежей мглой;
Не пылит дорога,
Не дрожат листы ...
Подожди немного,
Отдохнешь и ты.

...

Johann Wolfgang von Goethe,

Egalaĵo (Noktokanto de migranto)

tradukita de Manfredo Ratislavo

Super ĉio iĝas
Kviet',
Kaj ne moviĝas
Pro ventet'
Iu foli';
Silentas la birdoj ĉirkaŭe.
Atendu – baldaŭe
Ripozos vi.

...

Johann Wolfgang von Goethe,

Same tiel

tradukita de Richard Schulz

Super ĉiuj montoj
Trankvil',
Kaj ĉiuj fontoj
Sen babil';
Aŭdas vi ne
Birdetan ĉirpon arbare.
Pensu prepare
Pri la pere'!

...

Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de Johann Wolfgang von Goethe *(*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanto de* Pejno Simono *(Simon Edward Adrian Payne, *1941-12-23).*

Arg-356-1974 (2014-03-14 14:12:56)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en `http://eo.wikipedia.org/wiki/Goethe`.

Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de Johann Wolfgang von Goethe *(*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanto de* Poul Thorsen *(*1915-01-07 – †2006-01-30).*

Arg-356-708 (2010-05-28 21:34:24)

Poul Thorsen estis dana Esperantista poeto, kiu verkis multajn originalajn kaj tradukitajn poeziaĵojn en la Internacia Lingvo. Vidu ankaŭ: `http://www.poulthorsen.dk/` *kaj* `http://www.liberafolio.org/2006/forpasis-poul-thorsen/view`.

Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de Johann Wolfgang von Goethe *(*1749-08-28 – †1832-03-22) en la Rusan de* Михаил Лермонтов *(*1814-10-15 – †1841-07-27).*

Arg-356-1908 (2013-12-12 22:16:00)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en `http://www.winter-zeulenroda.de/webseiten/lermontov.htm`. *Vidu ankaŭ la retejon* `http://otvety.google.ru/otvety/thread?tid=6b82c0f69fbac986`. *Pri la poeto Lermontov vidu la retejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/МиДжаил_Lermontov`. *La rusa titolo signifas: El Goethe. La poemo estas de M. Lermontov libere tradukita en la rusan. Ĝi estas konata en Rusio laŭ tiu ĉi titolo.*

Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de Johann Wolfgang von Goethe *(*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanto de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1983-01.*

MR-03-4 / Arg-356-707 (2006-03-20 14:44:12)

Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de Johann Wolfgang von Goethe *(*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanto de* Richard Schulz *(Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 – †1997-09-26).*

Arg-356-706 (2013-02-26 15:16:30)

Tiu Esperantigo aperis komence de la okdekaj jaroj de la 20a jarcento en la "Vestfaliaj Flugfolioj", kiujn eldonis Rikardo Ŝulco (Richard Schulz), honora membro de Germana Esperanto-Asocio. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon `http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz`. *Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz`.